

8

## LA PREĜEJO SANKTA LUDOVIKO (SAINT LOUIS)

Tiu grava urba monumento karakterizas la novklasikan arkitekturon de la 19-a jarcenta komenco. La inĝenieroj desegnis konstruaĵon laŭ bazilika stilo, reference al greka templo. Ili ne planis konstrui flankajn kapelojn. Tiuj kapeloj estis konstruataj en 1824 por plifortigi la murojn de la navo. La preĝejo similas latinan krucon.

En 1830, oni konsekris la preĝejon al « Saint Louis ». Kasonoj kovras la grandegan volbon de la centra navo ; tiuj kasonoj estas okultrompe pentritaj per rozformaj ornamaĵoj. Troviĝas multaj objektoj, ĉefe polikromia ligna statuo pri « Notre dame de la Roche » skulptita de la dekkvara jarcento.



Rimarkinde :  
Franca flago staras sur la tegmento de tiu preĝejo.

9

## LA HALOJ

Ekde Mezepoko, la strato de Malnova Bazarro estis la svarmejo, tradicia loko por foiroj kaj bazaroj.

En 1811, la unuaj haloj el brikoj kaj ŝtonoj anstataŭis la provizorajn budojn. Interne, la konstruaĵo dividiĝis en tri ĉambregojn.

En 1887, la inĝenierkonstruisto Michelin starigis pli vastajn kaj pli lumajn halojn. Nova konstruaĵo kun subtera parkejo anstataŭis ilin en 1976. En Francio multaj haloj de la 19-a jarcento estis detruitaj.

Rearanĝante la nunajn halojn en 2000, oni provizis ilin de larĝa vitrotegmento.




L'association Espéranto-Vendée a pour but d'organiser la diffusion de la langue internationale espéranto dans sa région au moyen des cours et de diverses manifestations à destination des habitants et des visiteurs.

Les membres de l'association ont réalisé ce mini guide pour les touristes espérantistes qui désirent visiter les principaux sites remarquables de la Roche-sur-Yon. Bonne visite !

La asocio « Espéranto-Vendée » celas la diskonigon de la internacia lingvo esperanto en sia regiono, pere de kursoj kaj diversaj manifestacioj destinitaj al la loĝantoj kaj la vizitantoj. La asocioj realigis tiun gvidlibreton por la esperantaj turistoj kiuj deziras viziti la ĉefajn rimarkindajn lokojn de « La Roche-sur-Yon ». Bonan viziton !

## ITINERO



Realigo kaj presado : Espéranto-Vendée  
kontakto@esperanto-vendee.fr  
<http://esperanto-vendee.fr>

# La Roche sur Yon

## Esperanta turista gvidlibreto



7

## LA PLACO « NAPOLEON »

Tiu unika verko en Francio rilatas al la historio de la urbo, nedisigebla de « Napoléon ». Admiru la bestojn kvazaŭ alportitajn el la Egipta kampanjo de Generalo « Bonaparte » fine de la 18-a jarcento. La kompanio La Maŝino (La Machine) kreis tiujn mekanikajn bestojn. Krokodilo de la Nilo, dromedaro, hipopotamo kaj ranoj enlokiĝis en basenoj sur la placo. Junuloj kaj maljunuloj ĝojas movi tiujn strangajn kreitaĵojn per mantenoj kaj leviloj. Trankvile kuŝante en siaj basenoj la bestoj atendas, ke vi veku ilin. Jen do, ludu !

Imprimé par nos soins

0

## LA PLACO DE LA ANTIKVA HORLOĜO

Situanta en la centro de la malnova urbo, la placo de la antikva horloĝo ŝirmis la horloĝan belfridon.

Supre de la placo staras la plej antikva konstruaĵo de la urbo: la Renesanca Domo (1566), kiu enhavas ŝraŭban ŝtuparon kaj granitajn kamentubegojn. Klasifikita kiel historia monumento en 1930, ĝi akceptas konstantan ekspozicion pri la historio de la urbo.



Interesa ekzemplo de loka arkitekturo okupas la nordan parton de la placo apud la ĝardeno de Submajstroj (des Compagnons). Parto de muroj de la malnova poŝtoŭficejo ĉirkaŭas tiun ĝardenon kaj ties oldan puton kaj tradician bakforonon. La malnovaj vojoj kondukante al la placo atestas iamajn uzadojn: strato olda bazaro (vieux marché), strato la letera poŝtejo (la poste aux lettres), tri pilieroj (trois piliers)... La strato de « La Roche sur Yon », kiu nomiĝis la Granda Strato, kondukis al la kastelo kaj al la malnova paroka preĝejo.

1

## LA KASTELO

Pro sia geografia situacio « La Roche-sur-Yon » estis unu el la ĉefaj fortikaj urboj en regiono « Bas Poitou ». La kastelo menciita ekde la 11a jarcento iom post iom plilarĝiĝis kaj ĉirkaŭiĝis per muroj.

Pro fama nevenkeblo, ĝi havis strategian gravecon dum la jarcenta milito inter franca kaj angla reĝlandoj.

Ĝia ruiniĝo precipe rezultis el religiaj militoj. Ĝia graveco definitive ĉesis en 1629, kiam « Louis XIII », laŭ rekomendo de « Richelieu », subskribis edikton por disfaligi ĝin. Origine, la kastelo konsistis el fortikaj partoj, kiuj unue inkluzivis altan korton kun ĉefturo kaj turoj, due malaltan korton kaj laste fortikan urbon. Nuntempe superstarante la rivereton « Yon » restas nur muregoj, kiujn oni povas malkovri de la riverbordo.

2

## LA ŜTATA ĈEVALBREDEJO

En 1842, la franca reĝo « Louis-Philippe » konsentis krei ĉevalbredejon en « La Roche-sur-Yon ». Ĝi okupas 4,5 hektarojn, kie kuŝis antaŭe botanika ĝardeno.

Ĝi aspektas kiel geometria kaj hierarkia tuto kun centre la domo de la direktoro. En 1905 dank'al 3 novkonstruitaj ĉevalejoj ĝi povis akcepti 200 virĉevalojn. Post la unua tutmonda milito la ĉevaloj perdis sian militan rolon. Nuntempe, ĝi konservas ekonomikan utilon kaj kontribuas al protektado de rasoj. Ĝi permesas transdoni artojn de hufferado kaj selfarado. Multajn ĉampionojn generis iuj virĉevaloj (Feu Follet, Une De Mai, Idéal Du Gazeau...)



Proprietajo de la departementa konsilio de 2006, nun ĝi estas kultura kaj turisma loko. Ĝi ankaŭ estas formada centro, interalie por selfarado, kies ateliero estas fama en la tuta lando.

3

## LA PREFEKTEJO

La 25an de majo 1804, « Napoléon » dekretis translokigon de la departementa ĉefurbo de « Fontenay-le-Comte » al « La Roche-Sur-Yon ». Tiam urĝis starigi konstruaĵon por akcepti prefekton kaj oficistojn. La prefektejo estas unu el la unuaj konstruaĵoj starigita en la nova urbo.

La prefekto elektis starigi ĝin sur malĉefa placo por protekti sin kontraŭ la trobruaj foiroj kaj bazaroj.

La klasika arkitekturo similas privatan hotelon kun perono kaj vestiblo. Du flankaj ĉe la meza konstruado ĉirkaŭlimas oficialan korton. Nuntempe parko plilongigas la prefektejon. Prefekteja placo « François-Mitterrand », estas ĉirkaŭata de ŝtndomoj, kies arkitekturo plivalorigas la prefektejon.

4

## LA DOMO GUEFFIER

En 1806, ĉefinĝeniero rekomendis konstrui soldatejon kaj ŝtatoficistajn loĝejojn, kies muroj estos el tero. Tiu termuraĵo estas masonaĵo de tavoloj el kunpremita tero en ŝelajo sen pajo nek ligno.


Iom post iom ŝtndomoj anstataŭis ilin. La domo Gueffier, la sola termuraĵdomo, kiu postrestas en « La Roche-sur-Yon », iĝis en la jaro 2002 artcentro kaj skribateliero. Flanke de esplanado, la fasado estas ornamita per skulptaĵoj. La domo estas nomita « Gueffier » laŭ la nomo de sia lasta posedanto.

5

## LA POŝTOFICEJO

Poŝtoŭficejo en « La Roche-sur-Yon », en la 17-a jarcento, situis proksime de la Placo de la Malnova Horloĝo; poste, en 1816, en la urbodomo kaj, en 1885, sur la strato « Paul Baudry »; finfine, ĝi anstataŭis malliberejon, kiu ne plu estis uzata de 1903.

Ĝi aspektas kiel artdekorata stilo (Art Deco) kun kvadrataj fenestroj, geometriaj ornamaĵoj kaj multaj mozaikoj.



6

## LA URBODOMO

La konstruado de la urbodomo, decidita okaze de la vizito de « Napoléon » la unua en 1808, estis finita en 1813.

La konstruaĵo konsistis el ĉefa parto kun etaĝo kaj du flankaj aloj. Ĝi estas 50 metrojn longa. La du aloj estis plialtigataj ĝis la nivelo de la centra parto en 1843. En 1970 la domo duobliĝis ĝardenflanke.